

Kataluna Esperantisto



NUMERO 347 (113)
KVINA EPOKO
JULIO-SEPTEMBRO 2008

Riĉega kongresa programo

*Nacilingve pri lingva
diverseco*

Jaume Viladoms ekspozicie

Novaĵoj en la biblioteko

*La kataluna esperantistaro
en libro de Rosenthal*

Infana Kongreseto

*UEA kaj KEA, ĉu diverĝantaj
starpunktoj?*

*La repressió sobre
l'esperantisme català
durant la dictadura
de Primo de Rivera*

La internacionalització de les universitats europees: Els reptes en matèria de política lingüística

La reforma universitària és un important tema de debat en diversos països europeus. La globalització i les emergents economies asiàtiques han comportat canvis profunds en l'estructura de l'economia mundial. Per a poder fer front a una competència cada vegada més dura, els països industrialitzats estan obligats a augmentar les seves capacitats de crear innovació; és a dir, de crear productes nous i cada vegada més difícils d'imitar. Les universitats i els centres de recerca tenen, doncs,

un paper central en la que s'ha anomenat **l'economia fonamentada en el coneixement**, perquè és a les universitats i als centres de recerca on es produeix i es transmet el saber.

El març de l'any 2000, els caps d'estat i de govern de la Unió Europea van fundar una estratègia anomenada "**estratègia de Lisboa**" per a fer de la Unió Europea l'economia més competitiva del món abans de 2010. L'estratègia de Lisboa va lligada al **procés de Bolonya**, en el qual partici-

Segueix a la pàgina 11





Kataluna Kongreso

Kiel en multaj esperantaj asocioj, ne multaj homoj entreprenas la plejmulton da asociaj taskoj. Simile okazas en KEA, kaj tiujn laborfortojn tute ĉerpas la finjaraj projektoj, inter ili la decembra Kataluna Kongreso, tri nacilingvaj rondaj tabloj pri lingva diverseco, novaj eldonaĵoj, kaj preparo por venontjaraj aranĝoj. Speciale la Kongreso okazas ja ĉiun duan jaron, preferante pli riĉan programon ol oftan renkontiĝon. Kaj riĉa programo ne rilatas nur al abundo de proponoj, sed ĝi rilatas ankaŭ al la alte taksataj invititaj prelegontoj.

Ŝajne jam internacie konatas la intencoj de la kataluna esperantistaro, post mondgazeta publikigo de artikoloj rilate al ideoj lingvoprotektaj. La kongreso rezultigas spegulo de tiu volo, laŭ la temo “Esperanto kaj tutmondiĝo: perspektivoj por la estonto”. Ni esperas, ke la programo, al kiu elstare kontribuos Humphrey Tonkin kaj Giridhar Rao, establos kleran bazon, de kiu komencu pliaj internaj asociaj debatoj: kiel KEA plej influu la estonton, laŭ siaj asociaj principoj, konsidere la deziron de la asocioj sin doni al tiu celo. Ju pli asocio similas al laborego de sola homo, kaj tion ŝajne konas tutmondaj esperantistoj de proksime, des pli asocioj deziru revizii fundamenton de asociiĝo. Ni ne trovis ankoraŭ la sukcesan formulon, laŭ kiu amaso da asocioj, pene, kune kaj similvektore, atingu kundeciditajn mejloŝtonojn por komuna celo. Certe ni ion ne trafas. Ĉu la asociojn, la mejloŝtonojn, la celon, aŭ ion eĉ ne konsideratan?

Bonŝance la Kataluna Kongreso venos baldaŭ!

Lluís Batlle i Rossell

En ĉi tiu numero kunlaboris: Andreu Gestí, Cesc Castellet, Darío Rodríguez, Éric Collignon, Ferriol Macip, Francesc Poblet, Gerard Sugranyes, Hèctor Alòs, Joan Català, Joan Gestí, Joan Inglada, Kristian Pinard, Llibert Puig, Lluís Batlle, Michele Gazzola, Montserrat Franquesa, Onjo Ĉernišova, Ziko van Dijk.

Kataluna Esperanto-Asocio:

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj Esperanto, Kontakto kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerkliniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Faks: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listestro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2008: individua abonanta membro, 60 eŭroj; pensiuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 120 eŭroj; individua dumviva membro, 1200 eŭroj; kolektiva membro, 120 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona agència 461 Sabadell, kontonumero: 2100 0461 90 0200055053

IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053

Konto UEA: kaea-b

CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Llibert Puig i Gandia, vicprezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Ferriol Macip i Bonet; kasisto: Àngels del Pozo Serrano; komitatanoj: Hèctor Alòs i Font, Gemma Armadans, Gerard Escuer, Ramon Perera. Kontrola Komisiono: Núria Coll, Christian Pinard, Óscar Puig.

Kataluna Esperantisto:

Lluís Batlle i Rossell; esperantlingva revizianto: Hektor Alos i Font; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrita ĉe “Generalitat de Catalunya” en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: kej@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/kej
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Banko: Caixa d'Enginyers, kontonumero: 3025 0002 47 1433276794
IBAN: ES89 3025 0002 4714 3327 6794

Estraro: Prezidanto: Jordi Aromí; sekretario: Carles Verdugo; kasisto: Xavi Batlle; informado: Guillem Sevilla kaj Pau Climent; esperantaj rilatoj: Joan Català; ne-esperantaj rilatoj: Roger Sanjaume.

Impres a/Presita ĉe: Copisteria Garriga, Ronda Zamenhof, 98, Sabadell, (Vallès Occidental), tel. 93 727 25 55. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Riĉega kongresa programo

La 34a Kataluna Kongreso de Esperanto, okazonta en Sabadell la 6an, 7an kaj 8an de decembro, estos eble la plej riĉa ĝis nun pro la kvalito de siaj esperantlingvaj prelegantoj, kiel Humphrey Tonkin –kunredaktoro de la revuo *Language Problems & Language Planning*, prezidanto de Esperantic Studies Foundation kaj unu el la plej prestiĝaj kaj akraŭdaj analizantoj de la esperantomovado–, Giridhar Rao –barata lingvisto, instruisto en la universitato de Hajderabado–, Nicole Margot –redaktoro de la revuo *Etnismo*–, Pedro Hernández –slavisto kaj tradukisto–, Floreal Martorell –muzik-aktivilo–, Elisabet Abeyà –pedagogo, verkisto kaj tradukisto–, Abel Montagut –verkisto–, Lluís de Yzaguirre –lingvisto, instruisto en la Universitato Pompeu Fabra–, Francesc Poblet –historiisto–, Òscar Puig –prezidinto de Centro Esperanto-Sabadell kaj de Kataluna Esperanto-Junularo–, Felip Artero –kontraŭmilitarisma aktivulo, fakulo pri Afganio– k.a.

Konsiderinda parto de la prelegoj turnos ĉirkaŭ la temo “Esperanto kaj tutmondiĝo: perspektivoj por la estonto”, pri kiu prelegos Humphrey Tonkin, Giridhar Rao, Nicole Margot, Òscar Puig kaj Abel Montagut. Tamen, aliaj prelegoj montras al ni aliajn kulturojn, kiel tiuj de Giridhar Rao pri “Lingvaj homaj rajtoj en Barato: la breĉo inter politiko kaj praktiko”, Pedro Hernández pri Kaŭkazio, Felip Artero pri Afganio aŭ la ateliero de Ďore Kasimir pri la kroata lingvo. En la mateno de la fermotago, kiel tradicie, sin sekvos literaturaj prelegoj; ĉi-okaze ni gustumos tiujn de Abel Montagut pri “Jules Verne kaj esperanto”, de Elisabet Abeyà pri la sankritisto kaj esperantisto Joan Mascaró kaj de Humphrey Tonkin. Krome, estos tempo ankaŭ por prezenti la aŭtomatajn tradukilojn el la kataluna kaj la hispana lingvoj al esperanto, fare de Lluís de Yzaguirre, kaj la novan libron “La Universala Kongreso de Esperanto de 1909 en Barcelono”, de Francesc Poblet, kaj aŭskulti Floreal Martorell kaj Alejandro Cossavella paroli pri esperanto-muziko, Lluís Batlle pri “lingvaj influoj al perceptado” kaj Joan Català pri *klaku.net*.

Tiuj kaj aliaj prelegoj, ne malhelpos, ke ni ĝuu la dancojn gvidatajn de Mon Cardona, la teatron de la Tuluza Teatra Grupo kaj eĉ



ZIKO VAN DIJK

Inter la prelegantoj al 34a Kataluna Kongreso de Esperanto elstaras la brit-usona profesoro Humphrey Tonkin

duoblan koncerton de Martin Wiese (iama ano de Persone) kaj Alejandro Cossavella (eksgrupestro de Porkoj).

Tamen krom riĉa kaj bunta prelegaro kaj elstaraj artaj programoj, la kongreso zorgos ankaŭ pri la kutima plaĉa etoso invitanta al babilado inter la kongresanoj.

ha

Nacilingve pri lingva diverseco

Okaze de la Internacia Jaro de la Lingvoj, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, KEA pretigas altnivelan aranĝon, en formato de tri rondaj tabloj kun la partopreno de elstaraj fakuloj. Sabaton la 29an de novembro, matene, sub la gvido de la nord-kataluna sociolingvisto Gentil Puig-Moreno parolos pri “kelkaj ekzemploj de la monda lingva diverseco: katalunaj proponoj” Antoni Mir, direktoro de Linguamón, Emili Boix, profesoro pri sociolingvistiko en la Universitato de Barcelono, kaj Joaquim Torres, prezidanto de la Asocio de Katalunlingvaj Sociolingvistoj. Vespere, la sociolingvisto Jordi Solé i Camardons gvidos interparolon inter la lingvistino Carme Junyent, membro de la Esplor-Grupo pri Minacataj Lingvoj de la Universitato de Barcelono, Montserrat Casacuberta, kunordigantino de la Centro por Lingva Normaligo de Girona, kaj la argentin-devena ĵurnalistino Patrícia Gabancho

La 34a Kataluna Kongreso de Esperanto estos eble la plej riĉa ĝis nun pro la kvalito de siaj esperantlingvaj prelegantoj

Okaze de la Internacia Jaro de la Lingvoj, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, KEA pretigas altnivelan aranĝon, en formato de tri rondaj tabloj kun la partopreno de elstaraj fakuloj

**La aranĝo reprenas
la torĉon
de la universitataj
antaŭkongresoj okazintaj
fine de la 1980aj jaroj
kaj de la elstarega
nacilingva programo
de la kongreso
de Mataró de 1995**

**Kataluna Esperanto-
Asocio lanĉos ĉi-aŭtune
la kvar unuajn numerojn
de la nova Kolekto Delfi
Dalmau. En ĉi tiu nova
kolekto eldoniĝos tekstoj
en la kataluna lingvo
pri lingvaj rajtoj
kaj lingva diverseco**

pri “la lingva diverseco en Katalunio: defioj kaj ŝancoj”. Fine, en la matena de dimanĉo la 30a de novembro, la politologo Jordi Armadans i Gil, direktoro de la Fondaĵo por la Paco, gvidos la interparolon inter Fèlix Martí, honora prezidanto de la Unesko-Centro de Katalunio kaj de la Instituto Linguapax, Arcadi Oliveres, prezidanto de Justícia i Pau kaj instruisto pri ekonomiko ĉe Universitat Autònoma de Barcelona, kaj la sociolingvistino Maria Àngels Viladot, instruisto ĉe Universitat Oberta de Catalunya. En ĉiu sesio, ankaŭ la publiko povos partopreni kaj starigi demandojn al la partoprenantoj.

Kvankam la formato estas nova por nia asocio, la aranĝo reprenas la torĉon de la universitataj antaŭkongresoj okazintaj fine de la 1980aj jaroj kaj de la elstarega nacilingva programo de la kongreso de Mataró de 1995. Per tiu ĉi nia asocio, kiel asertas ĝia Principaro, celas “kontribui al la vivtenado de la kultura diverseco kaj, aparte, de tiu lingva”, diskonigante ĝian gravecon inter la publiko. Tamen, la okazo montriĝas ankaŭ tre oportuna por diskonigi la intereson kaj la starpunktojn de la esperantistaro pri tiuj aspektoj al gravuloj kaj ligi kun kelkaj organizoj pli solidan kunlaboron ol ni havis ĝis nun.

ha

Nova Kolekto Delfi Dalmau

Post longa preparo, Kataluna Esperanto-Asocio lanĉos ĉi-aŭtune la kvar unuajn numerojn de la nova Kolekto Delfi Dalmau. Per sia nomo, la Kolekto fariĝos omaĝo al Delfi Dalmau i Gener (Figueres 1891- Barcelona 1965), pedagogo kaj lingvisto, fondinto de la reto de lernocentroj konitaj kiel Liceo Dalmau kaj prezidanto de Kataluna Esperantista Federacio en la 1920aj jaroj kaj antaŭulo de la sociolingvistiko en Katalunio.

En ĉi tiu nova kolekto eldoniĝos tekstoj en la kataluna lingvo pri lingvaj rajtoj kaj lingva diverseco. Temos pri ĉ. 20-30-paĝaj broŝuroj, laŭ la modelo de la Esperanto-Dokumentoj de Universala Esperanto-Asocio, kiuj celos la diskonigon de elstaraj tekstoj inter la esperantistoj, sed ĉefe inter la normala publiko. Tiucele, oni planas vastan distribuon al bibliotekoj, lingvo-lernejoj kaj asocioj, same kiel oni faras per *Kataluna Esperantisto*.

Tiujn kvar unuajn numerojn konsistigos la artikolo de la lingvisto Robert Phillipson “Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj”, intervjuo al la lingvistoj André Martinet kaj al la semiologo Umberto Eco, kaj artikolaro pri esperanto kaj lingvaj rajtoj surbaze de tekstoj aperintaj en *Kataluna Esperantisto*. Partoprenantoj en la Kataluna Kongreso de Esperanto en Sabadell ĝuos larĝan rabaton por la aĉeto de la kvaropo.

ha

Jaume Viladoms ekspozicie

Ni memoru, ke dum la tuta jaro 2008, la urbo Sabadell oficiale omaĝas sian eminentan filon Jaume Viladoms, elstaran esperantiston. Krom la diversaj aranĝoj okazintaj ĝis nun kaj raportitaj en *Kataluna Esperantisto*, ni aldonas la ekspozicion, kiun la urbestro de Sabadell kaj la kultura magistratano s-ro Lluís Monge inaŭguris la 1an de septembro ene de la oficiala programo de la loka Granda Festo. Unuavice partoprenis ankaŭ la membroj de la organiza komitato, inter ili la KEA-prezidanto Llibert Puig.

La ekspozicion oni povis vidi la tutan septembran monaton, kaj la esperantista flanko de la omaĝito estis brile reprezentita. KEA petis prezenti la ekspozicion ankaŭ dum la kongresaj tagoj en la sama salono de la kongresejo. Se ne eblas la tuton, almenaŭ ni celas prezenti la esperantistan agadon de la omaĝato.

La publikigo de memoriga libro kaj nia Kataluna Kongreso fermos la omaĝan jaron al nia karmemora pioniro.

lp

Planita artikolaro

Francesc Poblet kaj Hèctor Alòs redaktas artikolaron pri la historio de la kataluna esperanto-movado. La libron eldonos KEA en la venonta jaro kaj konsistos el kolekto de artikoloj, parte aperintaj, parte verkitaj specife por la nova verko. En ĝi oni planas la inkluzivigon de dudeko da tekstoj de Ferran Aisa, Jean Amouroux, Toño del Barrio, Manuel Casanoves, Joan Inglada, Robert Lloancy, Xavier Margais, Pedro Martín, Abel Montagut, Francesc Poblet, Llibert Puig, Jordi Solé i Camardons. Temos pri popu-

lariga teksto, sen piednotoj, kvankam fine de la volumo oni donos komunan bazan bibliografion. Kiel la cetero de la libroj de la kolekto pri historio de KEA, ĝi estos dulingva, katalune kaj esperante, por proksimigi la materialojn same al lokaj historiistoj, kiel al alilandaj esplorantoj pri la historio de la esperanto-movado. Tiucele kunlaboras en la traduko de la tekstoj ankaŭ deko da homoj.

ha

E@i denove publikigas katalunlingve

La eduka komputika esperanto-grupo Esperanto Ĉe Interreto (E@I) publikigis rete serion de filmoj “Esperanto Estas”, kaj eldonis tute novan DVD-diskon kun granda kvanto de esperanta komputila materialo. Kiel nova versio de antaŭa simila DVD, tiu ĉi enhavas ĝisdatigitajn filmojn, muzikon, librojn kaj multajn helpilojn por lerni esperanton. Ĉar E@I celas per tiu disko disvastigi la internacian lingvon inter homoj, kiuj ne konas ĝin, ili pretigis retan traduksistemon por prezenti la filmajn subtekstojn kaj plurajn enhavojn de la DVD en naciaj lingvoj. Membroj de KEA kontribuis al tiu traduko, denove uzante internacian altnivelan inform-materialon por diskonigi esperanton al la kataluna publiko.

red

Ekfunkcias retlisto por KEA-anoj

Ekde septembro, funkcias la retpoŝta listo kiu permesas aliri ĉiujn membrojn de KEA. Tiu ĉi sistemo, aprobita en freŝdata asembleo, permesas tuj informi asocianojn uzantajn interreton. La ekuzo de tiu ĉi retlisto helpas, sed ne malvalidigas la plu oficialan komunikan sistemon tra la poŝta koverto de la regula *Kataluna Esperantisto*.

red

Sukcesa budotago la 11an de septembro

En la kataluna nacia festotago, kiel kutime, esperantistoj disvastigis flugfoliojn kaj vendis librojn en la ĉiujara foiro pri la kataluna kulturo. Krom prezenti esperanton al multaj homoj, ni disdonis grandan kvanton de pasintaj numeroj de *Kataluna Esperan-*



ONJO ĈERNISOVA

En la kataluna nacia festotago, kiel kutime, esperantistoj disvastigis flugfoliojn kaj vendis librojn en la ĉiujara foiro pri la kataluna kulturo.

tisto, ĉiujn portitajn flugfoliojn kaj vendis mone rekordan kvanton da libroj –kaj esperantolingvaj kaj lokalingvaj– rilate al lingva ekologio. Multaj asocianoj deĵoris en la budo laŭlonge de la tago: Ferriol Macip, Àngels del Pozo, Lluís Batlle, Anna Raventós, Anneleen Nys, Onjo Ĉernišova, Jomo Milla, Carles Verdugo, Jordi Aromí, Roger Sanjaume kaj multaj aliaj almenaŭ venis saluti.

fm/red

Ni disdonis grandan kvanton da pasintaj numeroj de Kataluna Esperantisto, kaj vendis mone rekordan kvanton da libroj

Novaĵoj en la biblioteko

La centra biblioteko de KEA, en Sabadell, havas novajn librojn per la bonvolaj heredaĵoj de kuracisto en Cervià de les Garrigues –esperantisto en la komenco de la 20a jarcento–, kaj de Martí Garcia-Ripoll. Por ekscii la detalan liston da novaj libroj, eblas sin turni retpoŝte al la responsulo Ramon Llop. Francesc Poblet donacis al la biblioteko ankaŭ kopion de la libro *Banderes al vent!* *La barcelona de les utopies 1914-1936* (Meteora, Barcelono 2008), de David H. Rosenthal.

red

Kursfina vespermanĝo en CES

La pasintan 11an de julio 30 personoj kunvenis en la Centro Esperanto Sabadell okaze

de la tradicia kursfina vespermanĝo. Bona humoro, trankvila klaĉado ĉirkău bonguste-ga kuskuso de Marina, *ŝibeka*, tomatita pano, kaj internacieco danke al ĉeesto de Irina el Rusio kaj Vagn el Danio. Per tiuj elementoj okazis tiu sukcesa kaj agrabla momento.

ec

Tago de la asocioj en Prada

La 13an de septembro de 2008, sub bela aŭtuna suno kvankam iom malvarmete, okazis en Prada de Conflent la 3a forumo de la asocioj.

Niaj kuraĝaj gesamideanoj Laure kaj Michel Justafre deĵoris solaj dum la tuta mateno, reprezentante ĉiujn anojn de la grupo, tamen ilin helpis asocioj de Mosaique, kie la pradaj esperantistoj okazigas la kursojn ĉiun ĵaudon vespere.

Kiel ofte en tiaj foiroj, multaj miris pri tio, ke esperanto ankoraŭ ekzistas, kelkaj intersiĝis pri la grupo kaj ties agadoj, kaj tre malmultaj novaj aliĝis por la kurso. Ĉiuj povis konstati, surprize aŭ ne surprize, la aktivecon de esperanto-grupo en Prada.

kp

Ŝanĝo en la kursoj de Vilanova i la Geltrú

Post kunveno la 23an de septembro, la esperanto-grupo elektis novan lernolibron: *Gerda malaperis* de Claude Piron. Ĝi decidis la lundojn de la 17:30 ĝis la 19:00 kiel la plej konvenan rendevuan tempon por la grupanoj, en la Civita Centro "La Geltrú". Komenciĝis la 29an de septembro la lecionoj.

ji/red

En la amaskomunikiloj

Ferriol Macip ricevis longan intervjuon en COM Ràdio, por kiu la raportisto bone prepariĝis, kaj permesis al nia sekretario ŝpari respondojn pri kutimaj kliŝoj. Josep Maria Milla estis intervjuita en Ràdio Mataró, pro sia membreco en la kataluna esperanta grupo Kaj Tiel Plu. Ankaŭ en icat.fm diversaj anoj de la muzikensemblo partoprenis intervjuon. Ne mankis dum tiu ĉi periodo la mencioj al esperanto en diversaj gaze-

toj. En *Público* aperis artikolo pri senpaga gastigado, kun rekta aludo al la esperanta Pasporta Servo. Ankaŭ en *La Vanguardia* aperis tia artikolo, eĉ kun foto de nia samasocio Jordi Pedrós. En reta gazeto de Anioia, *La Veü Digital*, aperis artikolo pri la taglibro de Carles Berga, klarigante ke per ĝi esperantistoj informas la publikon de la regiono pri lokaj okazaĵoj rilataj al esperanto. Aliflanke, plende al la polemika "Manifiesto por la lengua común", kelkaj aŭtoroj uzis esperanton por montri similan, almenaŭ noblan, proponon, Kvazaŭ ŝerce, la alakanta eldono de *El Mundo* priparolis la malbonan staton de la strato Idioma Esperanto. Fine, plurokaze raportistoj uzis esperanton analogie al malsukcesinta aŭ malsana projekto.

red

Jam 400 uzantoj en la socia reto klaku.net

La 18an de aŭgusto registriĝis la uzanto numero 400 en la socia paĝaro *klaku.net*, grava nombro por tiu ĉi esperantista reto, kiu monaton post monato kreskas kaj donas pli bonajn servojn.

Klaku, esperanta informilo jam tre bone konsiderata, proponas liberan retejon por informiĝi kaj informi rapide pri multaj novaĵoj okazantaj en la mondo, kaj ĉio en la internacia lingvo. Laŭ la statistikoj de *klaku.net*, ĉiutage 2000 fojojn homoj vizitas la paĝaron, kaj multaj uzantoj el la tuta mondo partoprenas ĉiutage ĝin, ĉefe el Svedio, Koreio, Usono kaj Hungario. La partopreno plurnacia de *Klaku* tre kontentigas la subtenantojn, kaj tial ŝajne la projekto daŭros longe.

Tiun ĉi internacian projekton vizitas ankaŭ ne-esperantistoj, do ĝi ankaŭ diskonigas la lingvon kaj la viklecon de ties komunumo tutmonde. Sane kaj rapide ĝi kreskas de antaŭ du jaroj, kaj nun per ĝi eblas informiĝi rapide pri la lastaj forumoj de *lernu.net*, pri la lastaj aldonoj al la retgazeto *Libera Folio*, pri la lastaj komentoj en la forumoj de TEJO, pri informoj en Monda Kalendaro ktp.

Legu la oficialan blogon de *klaku* ĉe www.klaku.net/blog, kie la responsuloj informas pri la lastaj ŝanĝoj.

jc

Plende al la polemika "Manifiesto por la lengua común", kelkaj aŭtoroj uzis esperanton por montri similan, almenaŭ noblan, proponon

Klaku.net en Kontakto

Joan Català kontribuis al la dua numero de *Kontakto* de la jaro, dediĉita al “teknologioj kaj sciencoj”. La artikolo prezentas la TTT-ejon *klaku.net*, lanĉitan de li kaj kiu akiris rimarkindan sukceson en Esperantio. Per ĝi homoj rekomendas nove aperintajn retpaĝojn kaj komentas ilin. Joan Català lanĉis ankaŭ la Mondan Kalendaron (www.mondakalendaro.org), per kiu homoj povas libere aldoni kaj konsulti la programitajn esperanto-aranĝojn ĉie tra la mondo. Ĝuste nia samasocio prezentos la rezultojn de pli ol unu jara sperto de *klaku.net* en nia venonta kongreso.

ha

La kataluna esperantistaro en nova libro de Rosenthal

Ĝus aperis nova libro de David H. Rosenthal, *Banderes al vent! La Barcelona de les utopies, 1914-1936* (Meteora, Barcelono 2008). Li dediĉas plenan ĉapitron al esperanto kaj ties movado, precipe pri la esperantismo en Katalunio. Laŭ Francisc Poblet eblas dividi tiun ĉapitron laŭ tri partoj: a) mallonga historio de la kreado de esperanto, el la libro de Boulton, b) Superrigardo al la esperantismo en Katalunio, kun multo el la kronologio de Narcís Fluvià, kaj c) laŭliteraj deklaroj de Josep kaj Tomàs Alberich, interesaj pro la personaj konsideroj montritaj. Kvankam Poblet rimarkis kelkajn erarojn, li konsideras la libron tre interesa. Danke al li, la biblioteko de KEA ricevis ekzempleron de tiu ĉi interesa verko.

red

Katalunio en Internacia Infana Kongreseto

Dum la pli aĝaj gekongresanoj festis la UK en Rotterdamo, grupeto de kvardeko da infanoj kun aĝoj de 5 ĝis 15 jaroj veturis sabate la 19an postagmeze al Oostvoorne por partopreni la 39an IIK ĝis la 26a de julio, en la restadejo Samuel Naardenhuis, meze de arbaroj kaj akvokanaloj. La infanoj apartenis al diversaj nacioj, kiel: Francio, Belgio, Ĉeĥio, Svedio, Portugalio, Serbio, Irlando, Rumanio, Hungario, Germanio, Kroatio, Rusio, Nederlando, Hispanio kaj Katalunio.



MONTSERRAT FRANQUESA

Dum la pli aĝaj gekongresanoj festis la UK en Rotterdamo, grupeto de kvardeko da infanoj kun aĝoj de 5 ĝis 15 jaroj veturis sabate la 19an postagmeze al Oostvoorne por partopreni la 39an IIK

Kiel distribuo por la tagoj, la infanoj estis dividitaj en teamojn kun bestonomoj: serpentoj, vulpoj, ranoj, flamengoj, tigroj, ktp. Tage ni interamikiĝis danke al amuzaj sesioj. Marde ni marŝis ir-revene sep km. por viziti la urbon Brielle. Nia gvidanto Bert Schumann ĉiĉeronis dum la vizito. En merkredo, kiel ekskursata tago, ni vizitis la amuzoparkon Efteling, kie ni ĝuis la distrajn amuzilojn. La restantajn tagojn ni ege aktivis en diversaj ludoj: futbalo, tabloteniso, arbogrimpado, zigzagado, ĵetado de ŝtonetoj al la kanaloj ktp. –ĉio tre amuza. Sed ni plej ŝatis la internacian vesperon. Ĉiuj infanoj prezentis al la aliaj siajn konatajn kantojn, poemojn, historietojn. Tuj poste ĉe la muzikejo ni dancis ĝis noktomezo. Ni pasigis plaĉajn esperantajn tagojn.

Joan kaj Andreu Gestí Franquesa

Premio por la plurlingvaj informprogramoj de BTV

La programo Infos Idiomes (Infoj Lingvoj) de la Barcelona televida kanalo BTV ricevis la gravan premion Premi Nacional de Cultura, kaj la okazaĵo meritis atenton de diversaj naciaj gazetoj. Tiun ĉi premion fakte ricevas

La programo Infos Idiomes de BTV ricevis la gravan premion Premi Nacional de Cultura

la asocioj kaj organizoj de Barcelono, kiuj reprezentas diversajn lingvajn komunumojn, redaktantaj la informajn programojn elsendantajn ĉiun semajnon en 19 lingvoj, kiujn eblas kompreni ankaŭ per subtitoloj en la kataluna kaj spekti tra interreto. La aljuĝintoj argumentas, ke la informa programaro Infos Idiomes, jam dek jarojn ekzistanta, montras elstaran manieron uzi la televidajn elsendojn kiel publikan servon kaj ilon por integriĝo socia, kultura kaj lingva. Ni gratulas niajn samasociojn Ferriol Macip kaj Josep Maria Milla pro ilia jam delonga penado realigi la okcitanan elsendon de Infos Idiomes.

kvankam la lanĉintoj unue klopodos fari pedagogian kampanjon por konsciigi pli da homoj/esperantistoj pri la graveco de la honoriga okazaĵo. Tri membroj de nia asocio sin agnoskas lanĉintoj de tiu ĉi kampanjo, kiun KEA subtenas: Xavier Margais, Ferriol Macip kaj Joan Català. La subskribintoj ricevos de ili pliajn informojn, kiam evoluos la kampanjo.

red

Nia samasocio Hektor Alos, evidentigis malkongruon inter la agado de UEA rilate al ilia apogo multlingvismon

La Ondo de Esperanto intervjuis Hektor Alos

red

Unuaj rezultoj de la Kampanjo por Homa Digno

La pasintan novembron aperis reta kampanjo por pridiskuti la honorigon de la diktatoro Francisco Franco okaze de la 53a UK en Hispanio, la jaron 1968. La lanĉintoj celis kolekti sufiĉan nombron da subtenoj, por peli UEAn revizii tiun honorigon. Ĉi-julie la lanĉintoj malanonime sendis dankan leteron al la aliĝintoj al la kampanjo, kie ili informis ankaŭ pri ĝia sukceso. Laŭ ili UEA bonvole pretas agi ripare al la antaŭaj okazaĵoj,

Nia aktivulo Hektor Alos respondis pri UEA en intervjuo, kiun *La Ondo de Esperanto* starigis al pluraj esperantistoj. La demandoj permesis al la intervjuitoj opinii pri la rolo de la plej grava esperanta organizo. Nia samasocio evidentigis malkongruon inter la agado de UEA rilate al ilia apogo multlingvismon, dum ne agas sufiĉe por lingvaj malplimulto kaj kunlaboras kun asocioj kaj ŝtatoj, kiuj tre dubinde favoras lingvajn rajtojn. Li ankaŭ konstatis tion, ke malpli da homoj subtenas UEA, eble pro ĝenerala malemo asociiĝi, kaj konsilas al UEA prizorgi sian publikon kaj klopodi akiri novan, ĝisdatigante siajn agadojn kongrue al la sociaj ŝanĝoj.

red



Eksterlanda bildo de Katalunio tra esperantisto

Kiam oni gastigas esperantistojn oni atendas interesan kaj agrablan travivaĵon, sed de tempo al tempo gastigado rezultas en io pli grava ol simpla kaj riĉiga babilado kun homoj. Tiel okazis en Igualada pasintsumere, kiam Karles Berga gastigis triopon de slovenoj, inter kiuj troviĝis ĵurnalisto de aŭstria revuo komisiita verki artikolon pri Katalunio kaj la katalunoj. Sur tiu bazo, gasto kaj gastiganto tenis diversajn konversaciojn, kiuj fariĝis finfine la korpo de la artikolo. Poste sufiĉis verŝi al la slovena la esperantajn notojn kun iom da ĵurnalisma prilaborado, por atingi dupaĝan artikolon en *Dni*, kultura kaj eduka revuo eldonita de la slovena minoritato en Aŭstrio.

kb

UEA kaj KEA: Ĉu diverĝantaj starpunktoj?

Hektor Alos i Font

Universala Esperanto-Asocio (UEA) estis invitita prezenti sian starpunkton pri lingvaj rajtoj al la Homrajta Konsilio en Ĝenevo, organizo de Unuiĝinta Nacioj. Tiu ĉi estis poste diskonigita en gazetara komuniko de la 9a de septembro kaj esence ripetita en alia, sendita post ses tagoj. La novaĵo vekis la atenton de pluraj katalunaj esperantistoj, ĉar ĝi montras interesan kontraston kun kelkaj starpunktoj lanĉitaj de Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) en marto.

Rajto al edukado en la gepatra lingvo

La unua atentinda diferenco kuŝas en unu el la komencaj frazoj de la UEA-dokumento:

“La rajto de infanoj lerni sian gepatran lingvon kaj daŭrigi sian edukadon uzante sian gepatran lingvon, ne nur estas grava por ilia kulturo; ĝi estas fundamenta por ilia psika evoluo.”

Laŭ ĝi, ekzistas du malsamaj rajtoj de infanoj: la lernado de la gepatra lingvo kaj la edukado en ĝi. Laŭ la dokumento, tio estas eĉ esenca por la evoluo de la homa psiko.

Male, la KEA-dokumento diferencigas rajtojn inter aŭtoktonaj popoloj kaj enmigrintoj:

“[N]i konsideras necesa pozitivan diskriminacion por atingi la normaligon de la minorigitaj lingvoj en ties medio aŭ teritorio kaj tiel defendi la lingvan diversecon. Krome, ni pledas por la rajto de la enmigrintoj lerni sian denaskan lingvon, inkluzivante ĝin en la rajton je movo de la homoj.”

Laŭ tiu ĉi starpunkto, ne ekzistas universala rajto al la edukado en la gepatra lin-

gvo. La dokumento, ne postulas, ke ekz. Bulgario sin devontigu eduki en la kataluna la gefilojn de tiulingvaj enmigrintoj. Tiu eventuala rajto ne estas universala aplikebla, kaj, en la nunaj cirkonstancoj, ĝi ŝajnas neatingebla eĉ en la plej ekonomie riĉaj landoj. Fakte, se oni proklamas tian rajton, ĝi fariĝus praktike efektivegebla nur por la ĉefaj lingvoj, per kio pliprofundiĝus la abismo inter dominantaj kaj minorigitaj lingvoj.

Aliflanke, la lernado de la denaska lingvo estas principe tutmonde aplikebla (krom eventuale ĉe orfoj), kaj ties proklamado ne nur eksplicite malpermesas la ĉikanadon de la asimilemaj ŝtatoj kontraŭ ties lingvaj malplimultoj, sed ankaŭ, nerekte, instigas al la favorado de tiu lernado fare de la registaroj. Sendube, granda elpaŝo, por ke infanoj lernu sian gepatran lingvon, estas proponi lernadon ne nur de, sed ankaŭ en ilia lingvo en la publika instrusistemo. Do, la rajto proklamita de la KEA-dokumento ne kontraŭas tiun proklamitan de UEA, tamen la unua dokumento ŝajnas pli singarda pri facil-animaj proklamoj ol la dua.

Lingvohierarkio

Pli tikle staras dua aspekto de la dokumento de UEA, kiu rilatas al certa hierarkio de lingvoj aŭ, eventuale, al ne detalita divido de funkcioj inter diversaj lingvoj. La teksto asertas:

“UEA apogas lernadon de du, tri aŭ kvar lingvoj, laŭ la cirkonstancoj, t.e.

1. la gepatran lingvon,
2. la regionan lingvon, se ĝi estas malsama,
3. la nacian lingvon, se malsama ol la du unuaj,
4. internacian lingvon, kiu apartenas al neniu nacio –nome esperanton.”

En la proponita modelo, unua ŝtupo estas la hejma lingvo, kiu, ekz. ĉe enmigrintoj povas esti malsama al tiu de la ĉirkaŭa medio. Ankaŭ ĉi tiun lingvon, nomitan ‘regiona’, oni principe devas lerni: tio estas grava sinteno de la modelo, ĉar la larĝa plimulto de la ŝtatoj en la mondo ne postulas la lernadon de la loka lingvo fare de la parolantoj de la dominanta: Francio, Britio, Aŭstralio, Ĉinio ktp. Tio, principe, plene kongruas kun la citita starpunkto de KEA, en kiu oni pledas por aktivaj politikoj por la dignigo kaj normaligo de la t.n. ‘minorigitaj lingvoj’.

La UEA-modelo aldonas trian ŝtupon: la t.n. ‘nacian’, t.e. supozeble ŝtatan, kiu staras inter la ‘regiona’ kaj la ‘internacia’ tavolo, kie, kompreneble en esperanto-organizo, la neŭtrala esperanto estas proponita. Ĝuste ĉi tria ŝtupo estas la plej diverĝa elemento inter la modeloj de UEA kaj KEA: dum tiu KEA pli proksimas al la tradicia devizo “esperanto, dua lingvo por ĉiuj”, UEA aldonas mezan, ŝtatan tavolon. Tamen, ambaŭ modeloj subtenas unuan, bazan ŝtupon –la hejman–, per kiuj ili fakte devojiĝas de la gurdita esperanto-slogano.

Ĝuste la KEA-dokumento aparte akre kritikas modelojn, kiel tiun proponitan de UEA:

“Ni konsideras la konceptan kaj valoran dividon inter lingvoj internaciaj, naciaj kaj regionaj, manifestiĝo de lingva imperiismo. Neŭtrala lingvo, kiel esperanto, povas agi kiel ponto, favorante kaj substrekante la plenan egalecon de la lingvoj.”

Laŭ la kritiko, la aldono de meza ŝtupo inter la loka kaj la internacia lezas la “plenan egalecon de la lingvoj”. Fakte, se oni konsideras la dokumenton de UEA laŭ la kutima kompreno de la terminoj (t.e. ke ‘nacia’ egalas al ‘ŝtata’), ĝi subtenas la dulingvigon de i.a. katalunoj, eŭskoj kaj galegoj en la hispana.

El tio verŝajne logike sekvas la uzadon de la hispana lingvo en la ŝtataj limoj. Sekve, ne nur sud-kataluno kaj sud-eŭsko nature interkompreniĝu en la hispana, anstataŭ en la neŭtrala esperanto, sed ke la hispana estu la lingva perilo inter denaskaj hispanlingvanoj kaj la denaskaj katalunlingvanoj (almenaŭ ekster la limoj de Katalunlingvio).

Krome, la UEA-modelo starigas dubojn pri tio, kio okazu en lokoj kiel Arano: ĉu aranoj, krom la lokan okcitanan kaj la ŝtatan hispanan, lernu ankaŭ la katalunan, ĉar ili administracie apartenas al la Kataluna Aŭtonoma Komunumo? Tio ŝajnas la plej logika, ĉar la UEA-modelo baziĝas sur administraciaj unuoj, sekve la ekzemplo montras, ke la modelo ne postulas la lernon de ĝis kvar lingvoj (kaj, certe, libervole pliajn), sed ke ĝi povas postuli la lernon de ĝis kvin-ses lingvoj en lingvaj enklavoj.

La kritiko de la KEA-dokumento al la tri-ŝtupa modelo, paŭsanta la klasikan tri-ŝtupan administracian modelon (kun loka, subŝtata kaj ŝtata niveloj), ne estas senbaza. Almenaŭ en Eŭropo, sed ne nur, lingvo-anstataŭado okazas de la loka lingvo al la ŝtata: ĝis nun nenie en la kontinento oni raportas perdon ĉe aŭtoktona loĝantaro de la intergeneracia lingvotransdono favore al la fakta interŝtata lingvo (la angla), kiam tiu ĉi ne rolas, kiel en Britio kaj Irlando, kiel ŝtata lingvo. Male, ekzistas klaraj procezoj de lingvo-anstataŭado en multaj ŝtatoj de lokaj lingvoj al la ŝtataj: tial la KEA-dokumento kontraŭas la aldonon de deviga lernado de ŝtata lingvo kaj en diversaj punktoj proponas lingvopolitikojn favorantajn la lokan lingvon (eĉ kontraŭ eventuala tropezigo de neŭtrala internacia lingvo).

La impresoj estas, ke UEA sekvas la strategion enradikiĝintan en la periodo de Lapenna, kie oni serĉadis la simpation de la ŝtatoj por provi desupre enkonduki esperanton. La proponita modelo provas kiel eble malplej kontraŭstari la internan lingvopolitikon de la ŝtatoj, celante havigi al si aliancinojn por la enkonduko de esperanto kiel interŝtata lingvo.

Certe, la skizita UEA-modelo principe povas fariĝi granda antaŭenpaŝo por

multaj minorigitaj lingvoj, se laŭ nia kompreno de la kvar ŝtupoj, ĝi postulas la lernadon de la ‘regionaj’ lingvoj, je la sama grado de universaleco –en sia medio aŭ teritorio– kiel tiun de la ‘naciaj’. Tamen tio ŝajnas bonvolema legado de la deklaro, ĉar ne estas konate, ke ekz. francaj esperantistoj pledas por la universala instruado de la okcitana, bretona, korsa, eŭska, kataluna ktp. en ties lingvoteritorioj, same kiel la britaj ne pledas por la universala instruado de la kimra en Kimrio, nek la rusiaj, nek la ĉiniaj ktp. Verdire, la kataluna teksto ne pledas nur por lingvo-instruado, sed ankaŭ pri ellerno kaj publika uzado de “la minorigitaj lingvoj en ties medio aŭ teritorio”. Entute, do, montriĝas, ke aŭ la teksto priskribanta la UEA-modelon ne estas sufiĉe preciza, aŭ ke ĝi konsistas el belaj vortoj ne subtenataj de la efektiva agado de la landaj esperanto-asocioj.

Fakte, la ioma disvolvo de la skizitaj ideoj en la UEA-dokumento pli kredigas, ke ĝi defendas ne egalisman lingvomodelon, sed ke ĝi inklinas al tio, ke naciaj malplimultoj lernu la dominantajn ŝtatajn lingvojn, kaj ne male: t.e. ke la parolantoj de la hegemoniaj lingvoj estu kapablaj parolantoj de la lokaj aŭtoktonaj lingvoj por certigi al tiuj ĉi favoran medion por ilia disvolvo, anstataŭ peli ilin al hejma uzado, malalta socia taksado, malprospero kaj malapero. La teksto de UEA precipe substrekas la pli grandan lernosukceson de infanoj, se ili estas edukitaj en sia gepatra lingvo. Male, la KEA-principaro pli insistas pri elementoj kiel la “egaleco de lingva rajtoj de la individuoj” kaj la “multflankeco” de la informfluoj, kiujn ili konsideras “fundamento de paco”. Per pli egalisma modelo, la kataluna dokumento celas, ke “nenio [miskomprenigu], ke ekzistas lingvoj pli taŭgaj por difinitaj celoj”, kio, implicite, laŭ ĝi okazus, se oni konservas plurŝtupan lingvohierarkion.

Efektivigeblo

Laste, ne malutilus diskuti, ĉu entute unu aŭ alia modelo estas efektivebla: se oni proponas bele konstruitan solvon, sed evidentiĝas, ke ne eblas ĝin enkonduki, la eblo montriĝas ne reala.

Ĝuste oni ofte akuzas la esperantistojn pri nerealegibleco de iliaj proponoj, kion ekz. provis kontraŭstari la aluditan strategion de Lapenna, kiu serĉis desupran ŝparvojon por la ĝenerala adopto de esperanto kiel internacia lingvo. Nuntempe, ŝajnas klare, ke ankaŭ desubismo estas nemalhavebla, ĉar la enkonduko de esperanto postulas tro gravajn ŝanĝojn en la socio, por ke ĝi estu altrudita de demokratiaj registaroj al siaj civitanoj. Tial, ĉiu strategio celanta iaspecan “finan venkon” devas esti longa-kura, por certigi la konvinkon de la civitanoj pri difinita socia ŝanĝo.

Laŭ tiu kriterio, la triŝtupa modelo de UEA, kiu verŝajne pretendas kiel eble malplej enmiksiĝi en la interna politiko de la ŝtatoj, estas verŝajne pli bonŝanca. Tamen, necesas konsideri, ke la proponoj starigitaj de KEA ne malproksimas de la lingvopolitikoj funkciantaj en Svislando, Belgio kaj Kanado. Komprenneble ĉiu lando havas apartan historion, kulturalan kaj socian fonon, kiu ne estas facile ŝanĝebla: demokratia politiko pretendanta ŝanĝi difinitan socian situacion devas esti malrapide kaj plej singarde enkondukita, aparte kiam temas pri lingvoj, ĉar ili rilatas tre profunde al la psiko de la unuopaj individuoj. Tial, la propono povas ŝajni ŝoka por landoj kun antipode malsama tradicio lingvopolitika, kiel Francio, sed eĉ tie ĝi principe povus efektiviĝi post eble tri generacioj. Fakte, la ĝenerala enkonduko de esperanto postulus, en la plej favora okazo, ne malpli ol tutaj du-tri generacioj: t.e. simila kvanto da tempo. Laŭ tiu perspektivo, la skizita propono de KEA ne ŝajnas pli utopia ol la enkonduko de esperanto mem. Male, ĝi ŝajnas necesa komplemento por efektiviĝi la celojn de lingva demokratio proklamatajn de la esperanto-movado.

Entute, do, necesas engaĝiĝo de UEA por atingi pli kuraĝan, pli avangardan kaj pli detalan lingvomodelon, kiun ĝi proponu al la homaro, komence de la 21a jarcento. □

Aperinta en *Libera Folio* la 22an de septembro de 2008, www.liberafolio.org/2008/uea-kea

› ve de la portada

pen ja 45 països d'Europa i que té, entre d'altres, l'objectiu de fer convergir els sistemes europeus d'ensenyament superior d'aquí al 2010. La finalitat d'aquestes iniciatives és afavorir la creació d'un **espai universitari europeu** comparable al nord-americà que sigui capaç d'enfrontar-se als desafiaments de la competència en una economia globalitzada. És en aquest marc que cal analitzar el procés d'internacionalització de les universitats europees.¹

1. Els reptes de la internacionalització

Nombrosos observadors afirmen que per a augmentar la **competitivitat** de les universitats europees cal, entre altres coses:

- Lligar el finançament de les universitats a criteris que premiïn la qualitat de la recerca i de l'ensenyament. Per a mesurar la qualitat de la recerca i de l'ensenyament cal utilitzar **indicadors** que siguin els més objectius possibles i que permetin **comparar** les universitats.
- Eliminar qualsevol trava a la **mobilitat** dels estudiants i dels investigadors a Europa. Afavorir la mobilitat vol dir permetre als investigadors (sobretot als investigadors més brillants) desplaçar-se lliurement a les millors universitats, cosa que afavoriria la creació de centres d'excel·lència.

Es tracta d'un conjunt de principis de reforma que podrien tenir efectes positius, tot i que encara és aviat per a fer-ne balanç. Malgrat això, cal remarcar que aquests principis podrien implicar

¹ Per "internacionalització de les universitats europees" entenem en general el conjunt de reformes que tenen l'objectiu de fer augmentar el nombre d'estudiants i d'investigadors estrangers a les universitats d'un país i enfortir la competitivitat internacional d'aquestes universitats.

